

& La juĝo de Momos:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 /En la pratempoj, pri la mondo-kreo ;
laboris Zeŭs, Athena, Prometheo.

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ;
Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 (Kaj kiam Zeŭs pri l' taŭro tute
pretis,)×

'3 kaj Promotheo pri la homo, ; Athena
pri la domo,

'4 ili de Momos petis ; prijuĝi, kion ili
metis.

'5 Ĉi tiu, tre envia, ; parolis jene pri
labor' ilia:

'6 "Ba, Zeŭs la taŭron fuŝis, ne metinte
; okulon al ĝi korno-pinte.

'7 Tiaĵon eĉ ne indas ja kritiki: ; Ĝi nun
ne vidas, kien piki.

'8 Kaj Prometheo fuŝis tre mizere ; la
homon, ĉar li ne ekstere

'9 lokis la koron: Oni nun ne vidas, ; ĉu
bon' aŭ miso en ĝi sidas.

'10 Athena fuŝis pri la dom' sendube, ;
ĉar ŝi ne muntis radojn sube,

'11 ke, se l' najbar' tro tedas jam ĉikane,
; ĝin oni nur pluŝovu mane."

'12 Zeŭs, tre indigna pro l' envia juĝo, ;
lin puŝis de Olimp' kun tondromuĝo.
.....)